



AVENO 16 - Julio 1997

Karaj amikaj verduloj,

mi, kiel sekretario de AVE, salutas vin ^ciuajn nome de la partoprenintoj de la AVE-renkonti^go en Stuttgart kaj deziras sukceson en via laboro kaj bonfarton. AVE estas reto por tiuj, kiuj laboras en kaj ekster la verdaj partioj favore al ekologio kaj socio.

Nia filozofio (ekde la fondi^go de AVE en 1984): Realigo de pensado kaj agado la~u la principo, ke la vivo kaj ne la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ^ciu evoluo sur tiu ^ci planedo. Esperanto kiel internacia komunikilo per siaj ecoj lingva ne~utraleco, mondvasta aplikebla facileco adekvatas al la ekologia principo "Eta estas bela". Niaj konkretaj programoj paralelas al la "Programaj Gvidlinioj" (Masala ^ce Helsinki, 1993) de la EFGP (E~uro-pa Federacio de Verdaj Partioj).

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), statistike: 208 individuaj membroj, el tiuj 49 virinoj; en Afriko 3, Ameriko 11, Azio 9, A~ustralia 3, E~uro-pa 182. La sekretario elkore dankas por pluraj malgrandaj kaj grandaj donacoj, ili estas uzataj por kotizoj kaj salonoj por renkonti^gi. Se Vi havas informojn, kiuj povus interesi la aliajn AVE-anojn, bv. skribi al mi; longaj artikoloj estu por VERDire - la ekologiisma ^jurnalo en Esperanto.

Se en via regiono de la mondo estos renkonti^goj la Verda Partio kaj vi havas la eblecon partopreni tie - mi ^gojus se vi povus tie informi pri Esperanto. Mi pretas sendi informilojn. Nia origina informilo "Kial Esperanto por Verduloj ?" nun ekzistas en 6 e~uropaj lingvoj: ^Cu iu povas printi ^gin en la rusa - la tekston mi havas.

Fiksdatoj:

Kompreneble ne ^ciu AVE-ano povas partopreni je niaj renkonti^goj. ^Ciu estas publikaj. Tamen mi ^gojas, se Vi venas al unu de tiuj AVE-renkonti^goj.

E~uro-Azia AVE'97: 97-08-09/17 (2 h) en Jekaterinburgo (Ruslando) okaze de EA'97. Asocio de Uralaj Esperantistoj, p.k. 67, 620077 Ekaterinburg, e-po^sto: hrgo@sbank.e-burg.su . Mi veturos per trajno kaj poste da~urigos al Samarkand por viziti la Aral-Maran regionon. Krom la ^generalaj informoj pri AVE kaj la Verdaj Partioj ni havas la temojn: Ekologiaj Problemoj, Da~uripova Evoluo, Biodiverseco kaj Resursoj en Siberio, Aral-Mara regiono, Bering-Mar.

Tutmonda AVE'97: 97-02-26/.. en Adelajde (A~ustralia), okaze de la UK de UEA. Aldo Foa organizos tie ^ci AVE-kunsidon. Kiel provizora temo mi menciis titolon "Ekologio kaj Homaj Rajtoj", vi certe a~udis, ke en A~ustralia la civilizita socio volas civilizigi la infanojn de indi^genoj pere de ekster-familia edukado. Tio certe malkongruas kun la Homoj Rajtoj.

Int-a Junulara Kongreso (TEJO): 97-07-24/30 en Assisi (Italio) "La homo - ^Cu super a~u parto de la naturo". Mi mendis salonon; Krayg organizos publikan AVE-kunsidon.

Renkonti^go de E~uro-Afrikaj Verduloj 97-10-31/11-02 en Niamey (Niger).

Ni rajtas sendi reprezentanton kiel observanto. De Hans Bakker kaj Elisabeth Schwarzer mi ricevis adresojn de esperantistoj en Niamey kaj proksime kiuj povus reprezenti Esperanton tie. El tiuj Semedo respondis jese - do, Esperanto ver^sajne estos reprezentata tie. Tutmonda AVE'98: 1998-08-01/08 (2 h) en Montpellier (suda Francio), okaze de la 83-a UK de Esperanto; tie ni havos publikan AVE-renkonti^gon. Tuj poste:

AVE-seminario pri Verda Politiko '98: 1998-08-08/11 en la regiono Larzak-o (proksime de Montpellier): dank al Marie Pierre kaj Victor Sion. Diversaj tranoktadaj niveloj kaj vegetara man^gajo estas anoncita. La kostoj estos relative malaltaj (redukto eblos). Ni planis seminarion kun diversaj temoj, invitos EU-kandidaton por informi nin kaj diskuti kun li/^si la lingvajn problemojn en la EP; ekologia ekskurso diman^ce ne mankos. Vi povas provizore ali^gi jam nun por ricevi la detalan programon. Ges-oj Sion, Chemin de Fontinettes, F-59522, Lambres-Les-Douai. E-po^sto: mpsion@nordnet.fr

Raporto:

Okazis AVE renkonti^go en kadre de la EU-Esperanto kongreso pentekoste '97 (1997-05-19) en Stuttgart. Krom la memprezentado de la 15 ^ceestantoj estis raportoj: - du prezentadoj de AVE en Freiburg: okaze de IJK jarfine, prelego pri "mediaj Problemoj en la Triangula-Lando (CH/DE/FR)", traduko el bro^suro de germana mediprotekta ligo BUND, inkluzive de ekspozicio de rilataj bildoj (informilo en Esperanto haveblas); - prezentado de Esperanto / AVE ^ce konferenco de la Junaj E~uropaj Ekologistoj; - informstando ^ce EFGP (v.s.); - ^cu AVE partoprenu je interligo de NRO-oj organizita de la UN-oj (ni observos la aferon); - ni parolis pri la neceso de bestoprotekton je e~uro-pa nivelo; - agado (Aral-Mara informado; AVE-seminario; tradukplano de tema faldfolio "Por Ekologiigo de la E~uro-pa Ekonomio" de la Verduloj; - vigla diskuto pri ekologio konkurence al ekonomio, kion instigis s-ro Cwik.

Okaze de venonta UK en suda francio ni apelaciis al UEA kaj la~utlegis en la plena kunsido de EEU-kongreso: Ni, membroj de AVE, ^gojas, ke UEA ne enmetis ta~uro-batalon en la programon de la Valenci-a UK inter la lokajn vidinda^jojn.

Dum nia kunsido okaze de la EEU en Stuttgart ni konsente akceptas la saman sintenon por la UK en Montpellier. Tia decido kongruas kun nia gvidlinio: "la vivo kaj ne la homo devas esti la centra kaj pivota punkto de ^ciu evoluo sur tiu ^ci planedo". La spektaklo de ta~uro-batalo humiligas fortajn junajn bestojn por plezuri homan ludemon. LLK-ano de Montpellier diris al mi poste, ke unue ta~uro-batalo en suda francio estus ludo kune kun la bestoj kaj ne humiligo (^cu prave ?), kaj due, ke tian spektaklon ili ne enmetos en la programon.

Pri la Verdaj Partioj:

Por granda sukceso ni gratulas la francajn verdulojn "Les Verts". Ili gajnis 7 se^gojn en la nacia baloto kaj krome ilia prezidantino, Dominique Voynet, i^gis ministrino pri medio-protekto. La~u miaj informoj ili jam sukcesis haltigi la konstruadon de la granda kanalo de Rheno al Rhodano, kiu detruos i.a. la naturan pejza^gon la~u la rivero Doubs. Mi

raportis pri tio en AVENO-j 13 kaj 12.
Same la nukleaj centraloj, speciale la Superphenix kaj La Hague estos pridiskutendaj. Krome ekologisto de la partio Convergences Ecologie Solidarite, Noel Mamere, Bordeaux, ricevis sidon - (mi petas informojn pri li).

En Meksikio la Verduloj "Partido Verde Ecologista de Mexico" havas urbestrojn en tri urboj, kiuj estas indiĝenoj. Gratulon por la nuna sukcesoj:
1 senatoro, 10 naciaj deputitoj, kaj 4 sidoj en Meksiko-urbo.

Fondiĝis Federacio de Verdaj Partioj de la Amerikoj. Laŭ Wally du Temple kun lingvaj problemoj.
En Tajlando fondiĝo de Verda Partio estas en diskuto.

AVE alstrebas statuson de observanto je la EFGP. Mi partoprenis la kongreson de la EFGP (Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj) 97-05-02/04 en Berlino (Germanio). Intertempe estas 28 partioj kunligitaj. 16 el tiuj havas delegitojn en naciaj parlamentoj. En tri [kune kun Francio nun kvar] naciaj registaroj, estas Verduloj koalicie kaj disponas pri ministroj pri medioprotekto (Finlando: Pekka Haavisto, Georgio: Nino Chkobadze, Italio: Edo Ronchi, Francio: Dominique Voynet); krome en pliaj federaciaj registaroj, kiel ekz-e Nordrheno-Vestfalia (FRG).

Okazis la pludaŭro de la Oriento-Okcidenta Dialogo de la Verduloj: Unu de la temoj estis la trafiko kaj la Trans-Eŭropa Reto kaj la etendo de la Eŭropa Unio (kaj Schengen-Ŝtatoj). La Verduloj preferus plifortigi la fervojon kiel ĉefa transportilo. Unu de la obstakloj estas la diferenca larĝo de la reloj. Por persona trafiko laŭ mia sperto plej simple estus la solvo, kion trovis Pollando kaj Litovio, kie la uzantoj de la Balti-Express (Tallinn - Warsovio) simple ŝanĝas la vagonaron, kio daŭras 20 minutojn; kontraste al preskaŭ 2 horoj je la aliaj lokoj (Grodno, Jagodin, Chop, ..). Pro tio alia malavantaĝo sekvas, ke povas rezulti diferenco je la alteco de la pufroj; okazis plurfoje ke la germana fervojo ne toleris tian diferencon kaj elprenis 3 vagonojn el la vagonaro (propra sperto, prokrasto de plia horo).

Mi faris enketon pri la lingva egaleco en estonta Eŭropa Unio. Mi sendis similaĵon jam delonge al la EP-oficejo, sed ŝajne necesis persona kontakto. La rezulto:
- Ĉiuj komprenis, ke simple pro teknikaj kialoj ne plu eblas la egalrajteco por pli ol 10 lingvoj (nun estas jam 11 laborlingvoj) en la EU-parlamento kaj en la multaj laborkunsidoj.
- Plejmulto celas redukti la nombron de laborlingvoj al 3 aŭ 4.
- Kelkaj vidas eblecon por Esperanto kiel (kroma) neŭtrala pontolingvo.

El la EU-Parlamentanoj estis malmultaj en Berlino, kaj plejparte nur por unu tago; tial mi ne povis enketi ilin. Mi parolis kun Hiltrud Breyer kaj Magda Aelvoet, kiuj montris simpatian por Esperanto. Hiltrud intertempe skribis konfirmisian pozitivan opinion pri Esperanto al Germain Pirlot, kiu ĝenerale gvidas la Por-Esperanto-agadon por la membroj de la Eŭropa Parlamento.

La konsilio de la EFGP akceptis komunan tekston pri la enkonduko de eko-impotoj kaj kelkajn rezoluciojn pri: EU-transitvojo tra Svisio; Maastricht II; Albanio; eksporto de toksa rubo al Hungario; la Gabŝikovo akvobaraĵo de la

Danubo, je kio necesas ekologia esploro; konvencio por la Alpoj.

Alia ronda tablo pritraktis la publikaĵojn de la Verdaj Partioj; kaj la spertojn kun la gazetaro (k.s.). Hiltrud Breyer, MEP, estas bona ekzemplo de spertigo sur la kampo de gentekniko kaj anticipa informagado ĉirilate.

Verda Politiko por la Estonteco

Nia verda politiko celas agnoski problemojn kaj trovi daŭripovajn solvojn por ili. Mi nur listigas skize kelkajn urĝajn problemojn en la mondo; la listo ne estas kompleta - se vi havas malsamajn opiniojn aŭ eĉ aliajn sciojn, bv. informi min. Se vi volas, ke mi publikigu vian opinion, bv. skribi koncizan tekston.

Malagnosko de la Homaj Rajtoj en pluraj landoj pro diversaj kaŭzoj. Plejparto de la informoj venas de Amnesty International (AI) kaj la ĵurnalo "La Monde Diplomatique". La postuloj paralelas al la Programaj Gvidlinioj de EFGP kaj parte estas miaj personaj opinioj.

Ĉinio:

Mi gratulas Ĉinion por la regajno de Hong Kong; kiu estis unu el la lastaj kolonioj. Mi havas la esperon, ke ne nur la ekonomia forto de HK helpas la evoluon de Ĉinio, sed ke ankaŭ la tiea demokratio helpas al plia demokratia evoluo de la lando. Krome mi esperas, ke paralele la ĉinaj Aŭtonomaj Regionoj Tibeto kaj Sinĝang-Ujgur-lando (nomoj el la mapo de la Kartografia Eldonejo en Pekino) ricevos veran aŭtonomion.

En Tibeto kaj Ujgur-lando temas pri kulturo kaj religio, perforta subpremo de la alstrebo al aŭtonomio. Temas ankaŭ pri resursoj kiujn ŝatas posedi kaj eluzi Ĉinio (oleo en la Ujgur-lando; ligno, metaloj kaj setlebla grundo en Tibeto). Aliaj aspektoj estas la teknika kaj socia evoluoj de tiuj landoj. Multaj el la indiĝenaj enloĝantoj ne volas la socialan ŝanĝon en popolĉinan socion - sekve la plej aktivaj estas en malliberejo aŭ en ekzilo.

Mi provis publikigi tekston ĉirilatan en "El Popola Ĉinio" - ĝis nun ne eblis. Se iu de vi ankaŭ estas abonanto, bv. sendi vian kritikon al la redakcio (se vi tute ne havas ion por kritiki - mi pretas sendi miajn informojn). Kompreneble la redakcio ne kulpas - sed ili devus informi pli objektive.

Zairio / Kongo : la nova prezidento elŝaltis la demokratiajn partiojn - mi dubas ĉu nur por la momento por ekkonstrui la landon - krome temas pri grandaj komercoj rilate la metalajn resursojn.

Belarusio: La prezidento Lukaŝenko subpremas la liberecon de opini-esprimo kaj demokratian agadon.

Alĝerio: Eble la bildo ŝanĝiĝis post la baloto kiam eblis elekti Islam-favoran partion. Mi esperas, ke la terorigo de la popolo fare de la fundamentalistoj nun finiĝos. La lando devas trovi vojon inter religia ŝtato, kiu ne allasas liberecon de kredo kaj de moroj, kaj senreligia ŝtato (laikeca) kiu malagnoskas religiajn sentojn.

Irano: Interpretado de la Nobla Korano kaj la islamaj religiaj leĝoj laŭ vira vidpunkto. Ekzemple la ordono, ke virinoj vestu sin per longa mantelo kaj ne montru ilajn vizaĝojn. "Ĉador" estas ne praktika kaj eĉ ne detale postulita de la Korano. Tiamaniere ekz-e ne eblas veturi per biciklo. Fanatikuloj eĉ atakas biciklantajn virinojn, ĉar ili opinias ke

bicikli ne decas por virinoj. Krome temas pri vivdan^gera subpremo de homoj (Baha'i) kiuj deturnis sin de la Islamo kaj sekvis la religion de Baha Ullah (kiu vivis pli ol 100 jaroj anta~ue). Ni esperas, ke la nova prezidento redonos iom da Homaj Rajtoj al la popolo.

Alia ekzemplo estas la ^jurnalisto kaj eldonanto de ^jurnalo Adineh. Li nun estas tenata sub misteraj kondi^coj pro politikaj ka~uzoj – pro kritiko. La akuzo estas nekredbla por homoj kiuj konas lin. La~u la Homaj Rajtoj necesas almena~u publika proceso kaj honesta ebleco havi defend-advokaton kun la necesaj rajtoj. Al opinias, ke temas pri atako kontra~u la ^jurnalisma libereco. La AVE-sekretario (v.s.) petis la justicministron liberigi F.S. kaj atentigi la Homajn Rajtojn. ^Cu ne eblas, ke la revolucio kontra~u la fe~udala ^Sah finfine gvidu al demokrata socio, kie la religioj helpas balanci inter la diversajn interesojn.

El la okcidente~uroopa historio oni povas lerni, ke eklezio kaj religio devas esti dependa de la registaro. Tiam la papismo (re^gimo de la eklezianoj) dum longa tempo ka~uzis malbonajn sekvojn.

Indi^genoj en pluraj landoj estas subpremataj, ilia mediokonvena vivstilo malhelpas la ekspluatadon de la resursoj; la kompleksa sistemo de industrio, militistaro kaj registaro simple malagnoskas ilian ekziston kiel samrajtaj homoj kaj tial provas ekstermi la indi^genojn pere de diversaj metodoj:

En Kanado a~u Alasko milit-jetoj terorigas la brutaron pere de malaltaj flugoj.

En Siberio senzorga oleoproduktado detruas grand-aree la vivbazon de la boacoj.

En Orienta Timoro, kiu politike apartenas al Indonezio, la indi^genoj estas subpremataj - pro la ligno kaj aliaj resursoj.

"Civilizo:"

- televido, soligas la homojn, kio aparte gravas ^ce infanoj;
- lavango da filmoj kiuj glorigas krimojn kontra~u la H.R. kaj subtenas kontra~u-socialajn kondutojn;
- ekstermado de kulturoj kaj lingvoj.

Religioj ofte estas ka~uzoj por konfliktoj kaj interhoma malamikeco. Menciinde estas la interreligia dialogo, kion iniciis profesoro Kueng sub la titolo "Monda Etoso". La komuna koncepto jam povis redukti la ^jaluzon inter la religioj. Konferenco de la eminentuloj de la plejmulto de la religioj akceptis komunan tekston (trovebla en "Homekologio", okaze de la Tago de Paco (1996-07-26): L. Fiala, Fuegnerova 18, CZ-29001, Podebrady). Nun necesas anka~u konvinki la fanatikulojn, ke ili laboru je sia propra pliperfekti^go; kaj ili misiu per bonaj ekzemploj kontra~ue al la perforto de alikredantoj.

Malagnosko de Bestaj Rajtoj:

UN / Mondskale: ankora~u mankas ^generalan traktato por la Rajto de Bestoj.

E~uropo: Tenado de bestoj en nekonformaj ka^goj aux stabloj; nutroaldona^joj (ekz-e hormonoj) por rapidigi la kreskon a~u altigi la laktoproduktadon; plurtaga transporto de vivantaj bu^cotaj bestoj, ^car eksporto en islamajn landojn nur eblas je vivantaj bestoj pro la speciala metodo de bu^cado.

Azio: Mortigo de tigroj kaj aliaj sova^gaj bestoj pro seks-helpaj drogoj - kio rezultas kvaza~u el praa supersti^co - sed

sen tiu da~uripova praa koncepto, ke la homo estas parto de la naturo same kiel la bestoj kaj plantoj.

Ameriko: ekzercoj en Alasko malalte flugi en fuzaviadiloj terorigas la boacojn (certe ne nur tiujn); uzi hidrargon kaj cianidon por ekspluati oron venenigas riverojn en la sudo; forhaki praaajn (pluv)arbarojn ekstermas bestojn kaj plantojn; kome ^san^gigas la klimaton.

La Maroj: Trofi^sado; mortigo de delfenoj (kaj simile) en ret-egoj por fi^soj (tinuso); ^san^go de la ekosistemoj pere de enmeto de kemia^joj (pesticidoj, ellasa^joj el la industrio, ekz-e paperproduktado); for^jetitaj plastika^joj kiuj latente mortigas grandajn maresta^jojn.

Militoj:

Grund-minoj estas produktataj en multaj landoj, sed malpermeso enkadre de la UN ^gis nun ne eblas. Kelkaj landoj nun subskribis traktaton malpermesi anti-personajn minojn, sed la plej grandaj produktolandoj ^Cinio kaj Indonezio (^cu mi pravas ?) e^c ne partoprenis la konferencon.

^Ciutage estas kripligataj kaj mortigataj bestoj kaj homoj (civitanoj - ne nur soldatoj), pere de minoj.

Necesas haltigo de la produktado, sed necesas intensa detruo de la milionoj de ku^santaj kaj aliaj minoj ! Ekz-e anka~u tiujn "PARM" (Panzer-Abwehr-Richt-Mine), a~utomata granda mino kiu mem trovas tankojn (^cu eble anka~u busojn a~u civilajn veturilojn ?), kiujn produktas Daimler-Benz. Necesas fortigo de UN kaj OSKE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en E~uropo) (kaj similaj) por redukti la milito-dan^geron.

Unu el la multaj pacemaj organizoj estas la RIB (Armit-Infirma Oficejo, Umkircherstr. 37, D-79112 Freiburg). Ili kreis novan koncepton:

5 procentoj por la Paco. Tio signifas, ke ^ciuj landoj povas redukti siajn elspezojn por la militista sfero je 5 procentoj jare; kaj tiu ^ci monon ili investu en la sekvaj kampoj: Alitrejnado de soldatoj; konversio de armilfabrikoj al civilaj produktoj; konversio de militar-areoj; trejnado de homoj por solvado de konfliktoj; investi en la evoluon de justa (internacia) socio por redukti la socialajn problemojn el kiuj kreskas konfliktoj. RIB ser^cas internaciajn kulaborantajn grupojn - AVE subtenas la koncepton morale kaj informe.

La Inter-Registara Konferenco ene de la E~uropa Unui^go, Maastricht II, pli kaj pli montras la visa^gon de militar-industria komplekso:

Ili evitas socialajn normojn kaj plu da~urigas la nedemokratian sistemon de la EU. Ekzistas ja la E~uropa Parlamento, sed ^gi ne havas sufi^can forton kompare al la registaroj, kio estas la bazo de demokratio (la~u Wilfried Telkaemper, MEP).

Resursoj:

Atmosfera klimato: troa uzado de fosiliaj brula^joj, kio ka~uzas ^san^gon de la monda klimato; dezertigo pere de forhakado de arbaroj.

Ozon-tavolo: ankora~u da~ura uzado de gasoj (FKKH (fluorklor-karbonhidrido), k.s.) detruas la ozon-tavolon en la stratosfero, kiu protektas la vivantaron kontra~u la vivdan^geraj kosmaj UV-radioj.

Industrio-landoj: raboforma depreno de resursoj el aliaj partoj

de la mondo. Rapida evoluo kutime ne estas daŭripova.

Akvo:

La Aral-Marono en Centra Azio suferas pro depreno kaj neracia uzado de la riveroj. Industria kaj agrikultur-kemia malpurigo de la riveroj, lagoj kaj maroj endanĝerigas la vivantaĵon tutmonde.

Venenigo de la akvo estas reala ofte, nur la graveco diferas.

Mi donas kelkajn ekzemplojn:

- Produktado de oro helpe de hidrargo kaj cianido.
- Paperfabrikoj sen pritraktado de la elfluanta rubaĵo endanĝerigas la plej grandan resurson de dolĉa akvo, la Baikal-Marono; sed ankaŭ en Usono (ŝtato Florida) oni uzas malkonvenan kaj nedaŭripovan metodon kaj tiamaniere poluas la akvojn.
- Uzado de herbicidoj en landoj kun intensa agrikulturo.
- Forĵeto de sterko en la akvon de riveroj aŭ en la maron (en Hongkongo kie nur duono de la mastrumaj elfluakvo estas traktataj kaj eĉ plejmulto de sterko de porkoj kaj kokinoj estas ŝutataj en la akvon ("Trends in Analytical Chemistry" vol. 16, pp. 180ff (1997)).

Multaj NeRegistaraj Organizoj (NRO) batalas por la protekto de la akvo.

Plej konata estas Greenpeace, kiu agas mondscale je la plej gravaj ekzemploj; tamen necesas agado sur landa kaj loka nivelo por savi la medion kaj plejmulto de AVE-anoj faras tian laboron.

Tia ekzemplo estas "La Israela Unio por Medio-Protekto" kies membroj batalis sukcese kontraŭ la poluado de Kishon-rivero fare de Haifa Chemicals. Ilia adreso: Adam Teva V'Din, 21 Shneyour Street, IL-63326 Tel Aviv; e-posxto: iued@netvision.net.il

Biodiverseco: ekstermigo de specoj de flaŭro kaj faŭno.

Gen-teĥniko: miksado de genetika informo inter la klasoj da vivantaĵoj

- kelkaj riskoj estas jam konataj.

Ekzistas nordgermana fabelo: Malriĉa fiŝisto kaptas miraklan fiŝon, lasas ĝin vivanta. La fiŝo permesas dezirojn al li. La edzino havas ĉiam pli altajn dezirojn. En la sekva tempo ili jam posedas kastelon. Finfine ŝi deziras ke ili estu same kiel Dio. La fabelo finiĝas, ke la geedza paro denove sidas malriĉe antaŭ sia kabano.

Nuklea Teĥniko kaj Armiloj: kiuj endanĝerigas rekte grandajn regionojn kiel efektive la tutan mondon; jam dekomence pere de nuklea rubo: Ruslando (plurloke), Ĉinio (Lop Nor), Sellafield (Britio), La Hague (Francio), Pacifiko, Usono (Hanford).

Politikaj Solvoj (ne nur por EU):

Kelkajn ekzemplojn mi jam menciis supre.

Eko-impostoj: Nun la komisiono de la Eŭropa Komunumo decidis, ke ekologiaj impostoj estus eblaj. Do, impostoj por la uzado de energio (precipe fosilia) havus la efikon ke kreiĝus pli da laborlokoj por konstrui la rimedojn; kaj ke la fosiliaj resursoj estos uzablaj pli longe.

Mi opinias, ke ekz-e necesas mondskala impoŝto favore al la

UN-oj je aviadila keroseno.

Maastricht II kaj la Alternativa Pinto en Amsterdam finigxis. Pluraj grupoj ekz-e la GAJB (Verd-alternativa Junularo de FRG) biciklis tien kaj postulis ke la sekvaj punktoj ankaŭ estu kriterioj por bona politiko en la EU:

- kreado de sociala unuigo kun baza sekuro por ĉiuj eŭropanoj;
- kvoto de senlaboruloj devas aparteni al la konverĝ-kriterioj;
- ekologia-sociala reformo de la impostoj por redukti la ŝarĝon de la laborantoj, tio inkluzivas redukon de la labortempo por ke redukti la senlaborecon.

- - - -

Bv. informi, se vi ne plu volas esti membro de AVE.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)
UEA-konto (por donacoj): avex-z
Sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62, DE-79194 GUNDELFINGEN
e-posxto (jaro 2020): ave@verduloj.org
hejma pagho: <http://www.verduloj.org>

AVE-membroj -
la liguloj inter Verduloj kaj Esperantistoj

Ni pensas tutglobe
Ni agas surloke kaj regione.

